

ARGENTINA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO
DE



JANUARO 1917

JARO 1^a

N^o 1^a



Asociación Esperantista Argentina

(ARGENTINA ESPFRANTO - ASOCIO)

Fundada el 20 de Diciembre de 1916



Agrupaciones adheridas:

"Esperanta Grupo Casal Catalá" (sección del centro Casal Catalá); "Liberiga Stelo" (sección de la Liga de Educación Racionalista); Centro "Verda Stelo" (Pergamino); Centro Esperantista de Buenos Aires, grupo "Zamenhof" (Zárate), Sociedad Esperantista de La Plata, grupo "Tagiĝo" (Capital).

Extracto de los Estatutos

La A. E. A., tiene por fin unir a todos los esperantistas de la República y aumentar más y más su número, intensificando la propaganda y enseñanza del idioma internacional auxiliar creado por el célebre filólogo polaco Dr. Zamenhof.

La forman dos categorías de socios: «grupos» (pertenecientes a agrupaciones adheridas) e independientes. Estos últimos pagan una cuota anual de \$ 1.00 m/n. y las agrupaciones \$ 0.50 anualmente por cada miembro adherido a la A. E. A. El órgano oficial de la Asociación es "Argentina Esperantisto" [El Esperantista Argentino], revista mensual dirigida y administrada por la Comisión Central. Forman ésta un presidente, un vicepresidente, dos secretarios, un tesorero y los delegados de las agrupaciones adheridas. Anualmente, en diciembre, en local elegido por la C. C., se efectuará una asamblea general con el siguiente programa:

Lectura del informe de la C. C., renovación parcial de la misma y discusión de las proposiciones hechas por la C. C., las agrupaciones y los socios independientes, publicadas por lo menos con 15 días de anticipación en Argentina Esperantisto.

Los esperantistas independientes que deseen ingresar a la A. E. A., envíen su adhesión [con el importe de la cuota anual, \$ 1.00 m/n. en estampillas postales a la Secretaría de la Asociación Esperantista Argentina

SAN JUNA 782 — Bs. Aires.

A LOS SUSCRIPTORES de Argentina Esperantisto, se les pide que indiquen con claridad su nombre y dirección al enviar el importe de la suscripción semestral [un peso, en estampillas postales de 0.05] al Tesorero de la Asociación Esperantista Argentina.

SAN JUAN 782

Argentina Esperantisto

Monata organo de Argentina Esperanto-Asocio

ABONPREZO:
En Argentino sesmonate \$ 1.—
En Eksterlando 1 jaro 2 Sm.

Redakcio kaj Administracio:
782 - SAN JUAN - 782
Buenos Aires (Argentino)

ANONCOJ: Du linioj en la
Fako korespondado, 1' res-
pondkuponon.

JARO 1.a

Buenos Aires, Januaro de 1917a

N.º 1

El Esperanto y nosotros

Los males e inconvenientes de todo género creados por la diversidad de idiomas hacían, desde siglos atrás, sentir la falta de una lengua internacional. A nadie ocultábansele los incalculables beneficios que reportaría a la Humanidad el hecho de que a todos sus miembros uniéralos el vínculo de una lengua común, aunque adoptada sólo con carácter de auxiliar, es decir, respetando la vida de las otras. ¡Cómo mejorarían las relaciones entre los pueblos! ¡cómo se facilitaría la difusión de las ideas! ¡cuantos fastidios ahorrados a los viajeros!... Pero ¿qué idioma elegir? He ahí la difícil cuestión. En Francia, opinábase que el honor de ser declarado internacional correspondía al francés; en Inglaterra, que al inglés... Los italianos, por su parte, amaban demasiado su habla dulce y sonora para dar la supremacía a otra; y lo mismo los germanos, los españoles, los rusos... En fin, el problema parecía insoluble. Pero, he aquí que, hace cerca de treinta años, un médico de Varsovia, L. L. Zamenhof, presenta al mundo, en un pequeño folleto, una solución genialmente simple: ¡un idioma armonioso, flexible y claro, que, gracias a sus ingeniosas reglas constructivas, a la admirable sencillez de su gramática, y al hecho de ser comunes a varios idiomas la mayoría de las palabras-raíces de su vocabulario, cualquiera podía aprender en cincuenta o sesenta horas!...

La «Lengua Internacional» del doctor «Esperanto» —seudónimo usado al principio por Zamenhof, que ha servido luego para designar su obra— encontró pronto entusiastas partidarios. Pero naturalmente, no faltaron los enemigos; los ineludibles, los encarnizados, los ciegos enemigos de toda nueva grande idea! Por otra parte, el reciente fracaso del «volapuc» (idioma enteramente artificial, cuya ruidosa aparición despertara en Europa tanta expectativa) había hecho escéptico al público. Fueron, pues, muy difíciles los comienzos del movimiento esperantista. Más no se rindieron sus sostenedores. Y, al fin, la simiente esparcida sin desaliento dió sus frutos. En los albores del siglo XX, suena para el Esperanto la hora de la prosperidad, precursora de la del triunfo. En toda Europa, en Norte y Sud América, en el Japón, en la China, en Oceanía, centenares de miles de hombres y mujeres, pertenecientes a las más diversas razas y creencias, sabios y obreros, literatos y

estudiantes, políticos y libertarios, militares y eclesiásticos, aprenden y usan la lengua internacional; fúndase por doquier sociedades de propaganda; efectúanse anualmente, con pleno éxito, congresos por millares de esperantistas procedentes de todas las regiones del globo; tradúcense al Esperanto las obras maestras de la literatura clásica y moderna, y compóneuse originariamente en este idioma notables trabajos literarios y científicos; grandes casas de comercio empiezan a usarlo para la propaganda y la correspondencia con el extranjero; aparecen más de cien periódicos, redactados en la nueva lengua; créase la Universala Esperanto-Asocio, institución que por medio de sus 1500 delegados, diseminados en los cinco continentes, brinda inapreciables servicios a todos los que conocen el esperanto, y muy especialmente a los viajeros...

De improviso, cuando con más entusiasmo y confianza se trabaja, estalla la guerra. En el acto, los "chauvinistas" de ambos hemisferios proclaman, regocijados, la muerte de los ideales internacionalistas. Pero no tardan en darles un soberbio mentís los nuevos millares de adherentes que la lengua internacional recluta hasta en los campamentos de prisioneros. La formidable prueba de la guerra le ha servido al esperantismo para demostrar, de un modo definitivo, su vitalidad.

Con más fe que nunca encaramos pues el porvenir, nosotros, los esperantistas de la Argentina, con más ardor que nunca nos disponemos a proseguir la lucha hasta el triunfo. Hemos logrado en el último año, cuadruplicar nuestro número, haremos más aún en el que empieza, ahora que Argentina Esperanto-Asocio nos da una nueva fuerza: la de la unión. ¡Queremos vencer, y venceremos!

LITTERATURA PARTO

Dialogo inter hombroj

De Augusto Alberto Constatt

Tiun nokton mi ne povis dormis, vane mi tralegis malbonan voĉum-ton de poezioj kiuj ne estis tiaj. La dormo estis kun mi malamikiĝintaj, kaj miaj okuloj larĝe malfermitaj, nur fermiĝis sub influo de malvolonta palpebrumo. Sufokanta varmo pli ekcitis la malbonhom-roŭ kanzitan de mia maldormo, kaj mia frauleca ĉambro similis filion de la infero, kie la ĉefdiablo faras siajn ĉiutagajn fiitajojn per pekintaj animoj.

Laca, ĝenata, furioza, ne sciante kion fari nek sur kian flankon min turni por ripozi laŭbonplaĉo de Morfeo, mi decidis mallumigi la lampojn kaj filozofante, filozofante... trankviligi mian finantan paciencojn ĝis kiam mia destino volos permesi ke mi tremigu la ĉam-

bron per la ronkoj amasitaj inter brusto kaj dorso, tute pretaj eliri post mia alvoko. Mi ne scias ĝuste, kiom da tempo pasis tiamaniere, sed mi estas certa, ke kiam mia spiro fariĝis pli malrapida sub invitoj de dormemaj signetcj, terura piko sur unu el miaj manoj min denove vekis. Per la alia mano mi sendis fortan baton sur la pikitan lokon kaj samtempe mi audis sopranan voĉeton kiu ekkriis: — Mortigulo! Vi povus averti ke vi kutimas vin grati per batoj... Bestaĵo!

— He!... Kiu troviĝas tie?... mi demandis iom alarmita. — Ĝi estas mi, kuleto kiun vi preskau premmortigis per viaj manaĉoj.

— Kiel! ĝi ne povas esti... mi ne konas kuletojn kiuj tiel flue parolas esperante.

— Nu, vi sciu, kara sinjoro, ke mi parolas esperante, hispane, france, angle, ruse, itale, kaj per ĉiuj lingvoj de la terglobo kiam tio estas al mi konvena, kaj ne nur mi estas bone instruita, sed eĉ mi estas ĝentila persono, ĉar antaŭ atako, mi tion sciigas per longa sonorado de mia trumpeteto; kontraŭe, vi estas idiotulo kiu preskau min pistis senantaŭaverto.

— Senkulpigu min, sed pravige al mi, mi devas vin konstati ke vi pikas terurege kaj ĉiu instinkte zorgas sin defendi.

— Lasu, sinjoro, superflujajn pravigojn, kaj diru bone kaj senkaŝe, ke vi ne ŝatas ke mi vin piku, ĉu ne vere?

— Tute vere...

— Nu, mia amiko (ŝajnis al mi, ke la kuleto estis iom fiera, ĉar li parolis per protektanta tono), tamen nenio estas pli justa ol mia rajto vin piki por min nutri. Vi estas tre bongusta besto...

— Mi dankas vian laudaĵon, sed permesu ke mi diru al vi, ke mi ne estas preta esti manĝaĵo de viaj festenoj (nun mia pacienco finiĝis) kaj mi tion vin avertas, sinjoro kuleto, ĉar tuj kiam vi intencos suĉi mian sangon mi vin premmortigos!

— Bone, bonege, mia respektinda sinjoro; vi estas la reĝo de la kreitaĵaro, la besto kiu pensas kaj rezonas, kaj parolas tiamaniere! Tre bone!... kaj kion vi respondos al mi pri la bovoj, birdoj kaj fiŝoj kiujn vi manĝas? Ĉu vi eble supozas, ke ili tute volonte estas pretaj akcepti viajn dentojn?

— Mi manĝas por vivi...

— Kaj mi?... vi certe respondos, ke vi estas pli forta, sed tio estas krimo kiun la homa logiko penas nomi bezonon; kontraŭe, mi, kvankam estas simpla kuleto, mi min nutras mortigante neniun. Mi vivas kaj permesas vivi la aliajn.

— Haltu nun! mia nevidebla parolanto; vi forgesas la malariajn febrojn...

— Ha, ha!... ne ridigu min. Vana senkulpigo kiun via inteligenteco uzas por kontraŭstari miajn argumentojn.

— Ni vidu... — Jes sinjoro, ni vidu ĉion kion vi volos; ĉu vi kredas, ke ni irus malpurigi niajn pikilojn en la malbonodorajn marĉojn por nin nutri, se la homoj permesus al ni, tute bone kaj senrivele, plenigi niajn ventrojn per la sango de liaj vazoj? Ne sinjoro, havu pri tio nenian dubon.

— Tamen, estas vero, ke vi estas kruelaj mortiguloj.

— Mi konsentas... sed, nur en grandega malsupera grado kompare al la homoj, ĉar por la febroj kiujn kontraŭvole ni transdonas al la homaro, ekzistas bonegaj evitiloj; kion vi opinias pri la kinino? sed la kompatindaj bovoj ne havas evitilon kontraŭ la tranĉilo, nek evitilon kontraŭ la hokoj la fiŝoj, nek evitilon kontraŭ la kugletoj la fiŝoj.

— Ne dudeble la kuleto posedis konvinkigan logikon, kaj ĉiu momente ĝi pli proksimiĝis al la venko de nia komencita interdiskuto, tio, kompreneble, min hontigis, tial, intencante frakasi mian ĝenantan interparolanton, mi direktis manbaton tien, kie mi supozis ĝi troviĝus. Mokantaj sonoj de trumpeteto sciigis al mi, ke mia bato tute maltrafis.

— Kiel sprita vi estas, kara sinjoro! Mankas al vi iom pli da facilmoveco. Vi estas besto de pezaj kaj malfacilaj movoj...

— Bone, diabla kuleto, mi estos ĉio kion vi volos kaj eĉ pli, sed bonvolu foriri por ke mi povu dormi.

— Ĉu, ke mi foriru? Ne sinjoro! ĉu vi supozas, ke mi foriros ne vespermanginte? Des pli nun, kiam mia apetito grandiĝis kaŭze de nia interparolado. Tute ne!

— Vi foriros vole aŭ ne vole... vi tuj vidos. Mi saltis el la lito, lumigis la elektran lampon kaj prenante pantoflon kiel modernan ŝtonĵetilon, mi serĉis la malsatan malamikon, sed tute vane, kiel mistera gnomo ĝi estis malaperinta. Mi mallumigis la lampon kaj fine pretiĝis dormi kiel senpekulo kiam, diablo! alian pikajon: tiun ĉi fojon en la oreilon.

— Ĉu vi dormas mia ŝatata mangajo?

— Sed... mia kuleta moŝto; ĉu vi ĉesos min ĝeni?

— Jes, tuj... sed, antaŭe permesu al mi vespermangi.

— Mi sendos vin vespermangi en la alian mondon, mi diris, kaj rapida kiel la penso mi denove lumigis la lampon kaj prenis la pantoflon. Mi serĉis la insisteman turmentiston kaj mi ĝin vidis; kiel punkto sur la muro apud busto de "Sevres" kiu prezentis faman naturaliston kaj entomologiiston kiun mi ne volas nomi. Mi ekdirektis, kaj, pum! jetis la improvizitan kuglon, sed tiel maltrafe ke ĝi renversis la malfeliĉan entomologiiston, ĝin faligis sur la plankon kaj dispeciĝis. Tio finigis mian paciencon kaj pelis min persekuti la malbenatan sangsuĉulon tra la tuta ĉambro; mi metis ĉion en plej kompatinda malordo, kaj malgrau tiom da penoj

mi ne sukcesis ĉasi la endiabligitan kuleton. Mi iris denove en la liton kaj restis kun la lampo lumiganta atendente ke ĝi malhonte proksimiĝu au almenau vidigu sin. Nenion. Pasis pli malpli duono da horo kaj mi konvinkigis ke la ricevita ekstimo ĝin decidigis serĉi mangajon aliloken; tial mi mallumigis la lampon kaj tranĉvili ĝinte mi atendis la dormon, kiu post mallongaj momentoj alvenis.

Mi ne scias kiam da tempo mi dormis kiam nova piko, kaj aliĵoj en la orelon (tiu ĉi lasta, pli dolora ol la antaŭaj) min malagrade vekis kaj mi audis la voĉon de la kuleto, kiu diris:

— Senfinajn dankojn, mia bongusta amiko, por via gentila senmoveco dum mia vespermango. Daurigu ĉiam tiele, kaj konsilu saman agmanieron al viaj konatuloj, tiel agante ni ne bezonos iri en la marĉojn, fokuso de mortigaj febroj. Vi vidos ke tiel malaperos la malariuloj, per tio la homaro gajnos, ni ankau kaj al vi oni starigos monumenton. Via tutkore.

La sekvantan tagon mi aĉetis densan kulŝirmilon.

Esperantigis, A. VILLAFRANCA

Kontrastantaj Monologoj

De OJANE TAYLOR

"Ho!" ekkriis grizara saĝulo, "kiel mallarĝa estas la tuta larĝeco de la homa scienco! Dum la tuta vivado, mi avide akiris sciadojn, kaj kian malgrandan sciadon mi posedas!. Ju pli mi penadas penetri la sekretojn de la naturo, despli mi konsterniĝadas. Krom kelkaj ampleksoj, ĉiuj estas konjektoj kaj konfuzoj, tial ke la saĝulo precipe superas la malsaĝulon ĉar li certigas al si la scipovon.

"Estas vere ke mi povas mezuri la sunon kaj kalkuli la distancojn de la planedoj; mi povas kalkuli iliajn periodajn movadojn, kaj eĉ kompreni la leĝojn per kiuj ili plenumas la mirindajn revolvojn: sed pri ilia konstruado kaj la estaĵoj kiuj ilin loĝadas, kion pli, do, mi scias ol la ignorulo?"

"Mi notas ke ĉiuj korpoj, ne subtenataj, falas sur la teron, kaj oni min instruis klarigi tion ĉi per la leĝo de gravitado. Sed kion mi gajnis tie ĉi pli ol termino? ĉu ĝi alportas al mia cerbo ian ideon pri la karaktero de tiu mistera kaj nevidebla ĉeno kiu altiras ĉiujn objektojn al la komuna centro? Mi notas la efikon, mi nomigas la kauzon; sed ĉu mi ĝin klarigas au komprenas?"

"Sekvante la naturaliston mi lernis diferencigi la regnojn de la bestoj, de la kreskaĵoj kaj de la mineraloj; sed ĉu mi povas diri, ĉiuj tiuj laboradoj, de kie devenas al unu herbofolieto la vivpovon? ĉu la plej grava zorgesplorado ebligas al mi eltrovi la ĉarmegan pentrilon kiu pentras kaj franĝas la kampajn florojn? ĉu mi iam eltrovis la sekreton per kiu ricevas la rubeno au la esmeraldo sian belegan koloron, au la arton per kiu la delikata konko emajligas?

„Forlasante la materian kreitajaron miaj pensoj ofte supreniras al pli altaj temoj kaj mi pripensas pri metafizikaj konjektoj. Kaj ĉi tie malgrau ke mi perceptas en mi mem la du apartajn ecojn, nome menson kaj materion, mi konfuziĝas je ĉiu peno por kompreni ilian reciprokan dependecon kaj misteran kunrilaton. Kiam mia volo movigas la manon ĉu mi posedas la plej malgrandan koncepton kiamaniere la volado estas aŭ komunikata aŭ komprenata?

„Ciam estas la homo batalanta kun sia propra nepoveco kaj vane pensanta sursalti la limojn kiuj malhelpas al li la korpemajn demandojn. Kion mi gajnis per la laboraj reserĉadoj krom konvinkon humiligantan pri malforteco kaj nesageco? Pri kia malgranda sciado povas la homo fanfaroni eĉ en sia plej alteco! Kia malsageco por glori pri siaj mallargaj povoj aŭ sin valori per siaj neperfektaj akiraĵoj!”

— o —

„Nu“, ekkriis juna fraulino kiu ĵus revenis de lernejo, „mia edukado jam finiĝis! Do, estus strange se, post kvin jaroj de laboraj atentoj, io ajn estus nekompleta. Feliĉe tio estas ĉio jam pasita, kaj al mi estas nenio fari krom praktiki la diversajn akiraĵojn.

„Mi vidu! Pri la franca lingvo, je tiu mi estas majstrino, kaj ĝin parolas, se eble, pli flue ol la anglan. Italian mi povas facile legi kaj elparoli tre bone. Muzikon mi lernis ĝis kiam mi estas tute nauza pro ĝi. Sed nun ke mi posedas koncertan pianon, mi devas daŭri iomete ekzercadi jes; la muziko estas la nura afero je kiu mi bezonas min plibonigi.

„Miajn desegnaĵojn oni universale admiradas, speciale la konkojn kaj la florojn, kiuj estas belegaj, certe. Krom ĉi tio, mi havas bonguston pri ĉiuj specoj da galanteriaj ornamoj. Kaj ankau en la dancoj kaj la valsoj mia majstro mem konfesis ke li ne povis min plue instrui.

„Pri vulgaraj aferoj — geografio, historio, fiziko, k. t. p. — mi tralernis ilin ĉiujn! Tial, mi nun povas min konsideri sata kaj tute bone informita! Nu, certege, kiel multe mi tralaboradis! La nura mirego estas ke unu kapo povas ĉion tion enhavi!”

El anota linvo tradukis: F. N. BATTEY

¡Esperantistas de la Argentina!

Vuestro periódico — “Argentina Esperantisto” — quiere y puede llegar a ser un importante factor de éxito para el ideal que anhelaís ver realizado. ¡Dadle, pues, robusta vida, suscribiéndoos todos a él! ¡hacedlo circular! Cuando hayáis leído este ejemplar, no lo ocultéis en cajón: ponedlo en manos de un amigo. ¡Que cada uno de vosotros sea un sembrador de la elevada idea!

OFICIALA PARTO

Argentina Esperanto-Asocio

AKTO PRI FONDO

En Buenos Aires, la nokton de la 20^a de decembro de 1916^a respondante al alvoko adresita de Organiza Komitato al ĉiuj esperantistaj societoj kaj izolaj esperantistoj el la Respubliko, kunvenis en la loko de la "Centro Esperantista de Buenos Aires", Cevallos 435, por fondi Argentina Esperanto-Asocio'n la jenaj grupaj delegitoj: Marcial Bover, de "Esperanta Grupo Casal Catalá", el Buenos Aires (125 anoj); Ramiro Estil-les, de la grupo "Liberiga Stelo", el Bs. Aires (25 anoj); Ludoviko Kelety, de la C. "Verda Stelo", el Pergamino (20 anoj); Vicente Albamonte, de la "Centro Esperantista de Buenos Aires" (14 anoj); Héctor Meroni, de la "Sociedad Esperantista de La Plata" (10anoj); E. Espinosa, de la grupo "Tagiĝo", el Bs. Aires (5 anoj); kaj sinjoroj Nicolás Benito kaj Miguel González, el Bs. Aires, kaj León Pochet, el Lanús, izolaj esperantistoj. Plie, sciigis per letero ke ili deziras aliĝi al A. E. A. sinjoroj Diego Salguero el Bahía Blanca, Dionisio Ruíz, el Baradero kaj Carmelo Liguori, el Santa Fé — Je la 9^a kaj 45 m., antaŭ multnombra samideana publiko, sinjoro H. Meroni kiel sekretario de la Organizanta Komitato, malfermas la kunsidon. Li sciigas ke la grupo "Zamenhof", el Zárate, kvankam ne estas reprezentata ĉe la kunveno, aprobas la ideon fondi la Asocion, kaj li legas leteron per kiu sinjoro Diego Salguero, ano el "Ateneo Esperantista de Bahía Blanca", informas ke tiu ĉi organizaĵo, pro foresto de ĝia prezidanto, ne povas nune preni decidon pri aliĝo al A. E. A. — Tuj, elektinte Sron Kelety por prezidi la kunsidon kaj Sron H. Meroni kiel Sekretarion, la kunsidantaro komencas la diskutadon de la Statuto projektita de la Organiza Komitato. Parolas Sroj Bover, Estil-les, Kelety, Albamonte kaj aliaj. Fine, la Statuto estas aprokata laŭsekve:

- Art. 1^a Argentina Esperanto-Asocio celas interrilatigi, unuiĝi ĉiujn esperantistojn el la Respubliko, kaj, per konstanta propaganda kaj instrua laborado, pligrandigi senĉese ilian nombron.
- Art. 2^a A. E. A. konsistas el grupaj membroj kaj izolaj membroj. Estas grupaj membroj tiuj kiuj apartenas al grupoj aŭ societoj aliĝintaj al A. E. A. Tiuj organizaĵoj pagasjaran Kotizaĵon da \$ 0,50 po ĉiu ano aliĝinta al A. E. A. La izolaj membroj pagas jare 1 \$.
- Art. 3^a La organizaĵoj aliĝintaj al A. E. A. konservas tute sian liberecon por agado.

- Art. 4^a A E A estas absolute neŭtrala rilate al politiko, religio kaj nacieco.
- Art. 5^a A E A eldonas kiel oficialan organon, monatan gazeton: "Argentina Esperantisto", ĉiuj asocioj, grupaj kaj izolaj, estas petataj aboni ĝin.
- Art. 6^a En decembro, ĉiujare, ĉe loko elektita de la Centra Komitato, okazos ĝenerala kunveno, por kiu ĉiu grupo aliginta nomos specialan delegiton. Tiuj ĉi delegitoj elektos el ili la tri novajn komitatanojn kiuj devos anstataŭi la tri eligantaj (laŭ loto) el la Centra Komitato. Plie en la ĝenerala kunveno oni aŭskultos la raporton de la C. K. pri agado kaj financaj aferoj de la Asocio, kaj diskutos la proponojn faritajn de la C. K., de la grupoj aligitaj kaj de la izolaj membroj, publikigitajn almenaŭ 15 tagojn antaŭe en la oficiala gazeto. Oni ne povas decidi pri ne publikigitaj proponoj. La izolaj membroj kiuj ial ne povas ĉeesti la kunvenon, kaj la grupoj kiuj ne povas sendi delegiton, voĉdonas per letero (kiu devas alveni al la C. K. antaŭ la malfermo de la ĝenerala kunveno). La grupoj rajtas tiom da voĉdonoj kiom da membraj kotizoj ili pagas.
- Art. 7^a Eksterordinara ĝenerala kunveno povas efektiviĝi se la C. K. aŭ la triono el la membroj tion postulas.
- Art. 8^a La C. K. administras la Asocion kaj la oficialan gazeton, direktas tiun ĉi kaj la ĝeneralan propagandon, aranĝas kursojn kaj ekzamenojn, klopodas por la formado de grupojn la lokoj kie estas esperantistoj, k. t. p.; ĝi konsistas el prezidanto, vicprezidanto, du sekretarioj kaj kasisto. Ĉiu grupo aliginta rajtas reprezentigi sin en ĝi per unu delegito, voĉdonanta kaj helpanta. La C. K. rajtas pleniĝi, en la okazo se iu el siaj anoj eksigas, elektante anstataŭanton. Se estas necese, ĝi povas aldoni al si helpajn subkomitatojn (ekzemple, por redakti la gazeton aŭ aranĝi ekspozicion).
- Art. 9^a La sidejo de A. E. A. estas en Buenos Aires.
- Art. 10^a Tiu ĉi Statuto povas esti ŝanĝata, per plimulto ba voĉdonoj, en ĝenerala kunveno, ordinara aŭ eksterordinara.
- Post tio, okazas la elekto de la C. K. — Laŭ la ĵus aprobita regularo, la delegitoj nomas prezidanto Sron. Marcial Bovér, vicprezidanto Sron Ludoviko Kelety, sekretarioj Sroj. Ramiro Estil-les kaj Héctor Meroni, Kasisto Sron. V. Albamonte, Kaj, fine, oni decidis ke la abonrezo de la oficiala gazeto estos 1 \$ por duonjaro.
- Havante nenion plu por pritrakti, oni ĉesigas la kunsidon je la 11^a horo kaj duono.

Marcial Bovér Héctor Meroni Ramiro Estil-les

RIMARKO — Sur la dua paĝo en la Literatura Parto troviĝas la vorto «hombroj» bonvolu legi «ombroj».

Importancia del movimiento esperantista

He aquí algunos elocuentes datos, contenidos en el "Libro Anual" de la Oficina Central Esperantista, de 1913. — Corresponden a estadísticas de 1912.

Número de Agrupaciones Esperantistas en EUROPA: Alemania 273, Austria Hungría 176, Bélgica 49, Bulgaria 16, Dinamarca 15, España 76, Finlandia 10, Francia 225, Gran Bretaña 152, Grecia 4, Holanda 55, Italia 20, Noruega 6, Portugal 8, Rumania 15, Rusia 89, Suecia 22, Suiza 30, Turquía 3.

EN AMÉRICA: Estados Unidos 106, Canadá 3, México 6, Cuba 11, Argentina 3, Bolivia 1, Brasil 24, Chile 37, Colombia 1, Perú 1, Uruguay 2, Venezuela 3.

EN ASIA: China 4, Indo China 1, Japón 8, Siberia 9, Ceylán 1, India 4, Malaka 1, Turquía 4, Turquestán 1.

EN AFRICA: Algeria 3, Egipto 1, Colonia del Cabo 2, Natal 1, Transvaal 1, Túnez 1.

EN OCENIA: Australia 13, N. Zelandia 8, Filipinas 1.

NOTA: — Estas cifras han aumentado considerablemente en los años subsiguientes.

KORESPONDADO

Salutojn sendas Sro. Josefo Prat — Strato San Juan 782, Buenos Aires — al ĉiuj siaj geamikoj esperantistoj el Boulogne-sur-mer; Saint-Omer; Calais, Lille, Roubaix; Saint-Amand-les-caux, Fresnes; París; Figueras; Barcelona; Berga; Urugvajo kaj Argentinio; dezirante scii novaĵojn de tiuj loĝantaj en la Norda Francujo kaj Belgujo.

JOSEFO PRATT

Chivilcoy F.C.O. (Argentino) — Sro. C. G. Perito. Str. Maipú 380 p. i.

Bs. Aires (Argentino) — V. Deulofue, Stro. Rivadavia 5757, pk. pm.

Silvania, Penn (U.S.N.) — Sro. Fred Canedy. pk.

Silvania, Penn (U.S.N.) — Pastro A. G. Cameron. pk.

London N.W. (Anglujo) — Fino. A. Barbouo, 19 Devonshire Hill Hampstead. pk.

Baku (Ruslando) — Sro. Vadimo Stopani, Sadovaja ul. 21, L, PI, PM, gazetoj.

Culemborg (Nederlando) — Ph. de Ruiter & Zoon deziraas rilatojn kun cigarvendistoj au komercistoj.

Breda (Nederlando) — Sro. J. Sterkmann, teknika desegnisto, Van Coothplein 52a, L, PI.

Enseñanza de Esperanto

CURSOS ORALES A INAGURARSE EN FEBRERO

Grupo „ Liberiga Stelo“ Local: Belgrano 2552.

Curso elemental: Lunes y jueves de 8 a 9 p. m. Comienzo: Febrero 1º

Curso superior: Miércoles de 8 a 10 p. m. Comienzo: Febrero 14

Esp. Grupo Casal Catalá Local: San Juan 782.

Curso elemental: Martes y viernes, de 8 a 9.50 p. m. Comienzo Febr. 2

Centro Esperantista de Buenos Aires Local: Cevallos 435

Curso elemental: Martes y viernes de 8.30 a 9.30 p. m. Comienzo: Febr. 2

CURSOS PERMANENTES POR CORRESPONDENCIA

Se envía semanalmente una lección. Cuota mensual, para gastos de impresión y franqueo: \$ 0.50. Diríjanse los interesados al Centro Esperantista de Buenos Aires, Cevallos 435 (curso de 25 lecciones) al Esperanta Grupo Casal Catalá, San Juan 782 (curso de 52 lecciones, con numerosos ejercicios), y al grupo Tagigo, Costa Rica 4324 (25 lecciones).

Libros para el estudio del Esperanto

COLECCIÓN ESPAÑOLA "ESPERANTO"

- | | | |
|------|--|-------|
| Nº 1 | Primeras Lecciones de Esperanto, del profesor Th. Cart. Traducción de A. L. Villanueva..... | 0. 35 |
| Nº 2 | Manual y ejercicios de la lengua internacional Esperanto, por don Vicente Inglada Ors, capitán de estado mayor, y don Antonio López Villanueva, profesor normal, con un prólogo de Carlo Bourlet. Presidente del Grupo Esperantista de París. | 0. 80 |
| Nº 3 | Vocabulario Esperanto-Español y Español-Esperanto. por los mismos autores y con un prólogo de P. Fruictier; nueva edicion en 2 volúmenes..... | 2. 60 |
| Nº 4 | Curso práctico de Esperanto y Clave de los temas y ejercicios contenidos en el Curso Práctico, por los profesores R. Duyos Sedó, capitán de infantería, y V. Inglada Ors, capitán de estado mayor, con una carta recomendación del Dr. Zamenhof. | 1. 60 |
| Nº 5 | Sintaxis de Esperanto, por don A. López Villanueva | 0. 40 |

Se remiten por correo contra giro postal. Dirigirse a, A. Villanueva, B. de Irigoyen, 1105, Buenos Aires